

MALGRANDA REVUO

aperas kvaronjare. Prezo 1 kr (inkl. sendkoston), je mendo de minimume 10 ekz. po 0,80 kr. Abono akceptata. Unuopa ekz. al eksterlando kontraŭ 3 int. respondkuponoj. Nroj 1/43 kaj 2, 3, 4/44 vendataj por po 0,55 kr. — Stellan Engholm, Skolgatan 9, Ludvika, Svedujo. Poŝtokonto 26 80 23.

PREZO: 1.- Kr.



MALGRANDA

REVUO

N:RO 1

1946

4-a JARO

ENHAVO:

	Paĝo
POR PACO KAJ KULTURO de Stellan Engholm	1
EINO LEINO de prof. V. Tarkkainen	7
POEMOJ DE EINO LEINO	10
MI KAJ MIA HELPANTO de P. Th. Justesen	17
PRI FILMO de Einar Hult	22
LA SITUACIO EN JAVA	25
MEMORAJ REBRILLOJ EL LA ARBARO de L. A. Bergström	28
KOMENTOJ	31

Redaktoro — Eldonanto:

STELLAN ENGHOLM, LUDVIKA, SVEDUJO

Por paco kaj kulturo.

De STELLAN ENGHOLM

La esperanta movado kaj precipe la esperanta spirito travivis la militon pli bone, ol ni kuraĝis esperi. Restarigo de organizoj kaj nova progreso estas multloke neatendite rapidaj. Ni estas pretaj daŭrigi antaŭen de tiu punkto, kie la milito haltigis nin en 1939.

Ĉu ni daŭrigu laŭ la malnova skemo kun intensa propagando por la plej facila, plej perfekta, plej bela, plej utila lingvo de la mondo, por ĝia nepra neceso en komerco, tekniko, politiko, trafiko, scienco? La demando estas stranga? Kion fari, se ne ĝuste tion?

Spirite ni estas la samaj kiel antaŭe, kaj ni estas pretaj daŭrigi de tiu punkto, kie ni iam devis halti. Tamen la situacio ne estas la sama. La rilato inter ni kaj la ĉirkaŭmondo iom ŝanĝiĝis. Ĝi ne fariĝis alikarakterata, sed unu afero pligraviĝis. La antaŭmilitaj propagandfrazoj fariĝis malgravaj kompare kun la demando pri paco aŭ milito, la demando pri daŭrigo de kultura vivo por la homaro aŭ reiro al spirite kaj materie plej primitiva vivnivelo. Tiu demando fariĝis por ni spirita postulo.

Post la unua mondmilito la ĝenerala devizo estis: neniam plu milito. Troviĝis firma deziro, ke milito ne plu okazu. Oni vere volis agi laŭ tio, kaj ĉiu firme kredis, ke milito ne okazos. Ĉu vi post la dua mondmilito renkontis iun personon, kiu firme kredas, ke milito ne plu okazos?

Ĉu vi renkontis iun, kiu kun entuziasmo kaj forta volo deklaris, ke ni devas malhelpi militon?

Subule rezigne la homoj atendas la estonton. Kelkaj grandaj decidas. Estas kvazaŭ lotado. Bona ŝanco donos pacon, alie sekvos io ankoraŭ pli terura ol la lasta milito. Sed kion fari?

Ĉu oni forgesis la atombombon? Ĉu oni kredas, ke ŝtatgvidantoj kaj sciencistoj pro inerto forlasis la aferon? Certe ne. Sed oni kutimiĝis al la penso, ke tiaj bomboj ekzistas kaj ke oni uzos ilin, se milito okazos.

Jus diri sciencisto, ke bakteria militado estas verŝajna. Oni multe laboris por eltrovi efikajn atakojn kaj efikajn kontraŭrimedojn. Bakteria milito estus natura sekvo de la lasta milito. Dum tiu la homa valoro havis tian inflacion, ke neniu povas opinii bakterian militon nekredbla. Kontraŭe. La ĝisnunaj militoj estas tre kostaj, ju pli modernaj des pli kostaj. La meza detrukosto por homo verŝajne estus riĉaĵo por ordinara homo. Biologio povas tre malkarigi militadon. Ne estus strange, se oni eĉ defendus bakterian militon per la motivo, ke ĝi estas pli humaneca ol bombado. Ankaŭ al tiaj pensoj oni povas rezigne kutimiĝi. Kion fari?

Oni bone scias, ke milito detruas ne nur homvivojn, kulturajn kaj materiajn valorojn. Ĝi efikas ankaŭ al la moralo kaj la ĝenerala konduto de la homoj, al la respekto-sento inter la homoj. Tiel ĝi reĵetas la spiritan evoluon multajn paŝojn malantaŭen. Ĝi ĵetas individuojn kaj popolojn al malpli alta spirita nivelo, kaj por denove altiĝi al la antaŭa nivelo oni bezonas jardekojn aŭ generaciojn. Kelkaj jaroj sufiĉas por plenigi ruinurbojn per sovaĝaj infanoj, kiuj havas nenian imagon pri ordinara homa moralo, por fari el honeste laborantaj homoj ekstersociajn estaĵojn, kiuj vivtenas sin per rabado. Sed jarcentoj estis bezonataj por krei bonan socian ordon. Tamen, kion oni povas fari?

Mi havas la impreson, ke tia estas la sinteno de la grandaj amasoj de ordinara homoj: subule rezigna atendo. Iam la laborista movado deklaris militon kontraŭ la milito.

Nun mi legis nenion tian en laboristaj gazetoj. Oni fariĝis realpolitika. Ankaŭ tie oni rezigne atendas kaj cetere okupas sin pri enlandaj aferoj.

Kia estos la estonto, se tia estas la ĝenerala sinteno? Estas facile fariĝi sklavo, se oni mem metas sian nukon sub la jugon.

Kio estas la kaŭzo de tia sinteno? Ĝuste tio, ke oni fakte ne scias kion fari. Oni ne scias manieron, per kiu ordinara homoj povas rekte kaj efike labori por paco. Tial oni rezigne transdonas al kelkaj grandaj decidi pri la sorto de la tuta homaro.

Tian impreson faras la ĉirkaŭmondo. Ĉiuj, kiuj partoprenis popolajn movadojn post la unua mondmilito, facile rimarkas la diferencon.

Tamen ekzistas solida fundamento por paciga laboro. La homoj vere estas inertaj kaj atendas kion ajn. Tamen la pli multaj homoj en la pli multaj landoj, verŝajne la pli multaj en ĉiuj landoj, malŝatas militon kaj volas vivi en paco.

Jen la ĉirkaŭmondo — kaj jen ni esperantistoj pretaj rekomenci nian laboron. Ni scias la rimedon kaj la metodon por kunigi la homojn el ĉiuj popoloj por krei pacon. El tiuj premisoj ni povas tiri nur unu konkludon: ke ni unualoke kaj per ĉiuj fortoj devas labori por aligi la homojn al internacia pacokrea laboro.

Neniom signifus esperanto, eĉ se ĝi estus ĝenerale akceptata kiel teknika rimedo por facila interkompreno, se la homaro tamen irus en detruon. Pli ol takseble granda estus ĝia signifo, se ĝi fariĝus rimedo por kunigi ĉiujn bonajn fortojn en la mondo, kiuj volas pacon kaj evoluon de ĉio bona en la homoj.

Ni devas rakonti al la homoj, ke ni laboras por paco, ke la sola solida fundamento por paco estas la pacamo de la homoj mem, ke ni povas atingi pacon nur per konscia kaj fervora laboro de ĉiuj. "La liberigo de la laborista klaso devas esti ĝia propra verko", estas saĝa laborista

devizo. La liberigo de la homoj de milito kaj ĉia subpremo same devas esti la verko de la homoj mem.

Antaŭ du jaroj mi havis en MR artikolon pri temo simila al tiu ĉi: Popolaj movadoj kaj paco. Se vi ne legis ĝin, vi povas mem facile elpensi, kiom signifus por paco la diversaj popolaj movadoj, laboristaj, religiaj, ekonomiaj, klerigaj ktp, se ili per helpo de esperanto fariĝus internaciaj kaj unuigitaj por unu celo, kiu vere estas komuna por ĉiuj: paco.

Estas tute simple nia devo, voĉo nin pelanta el interne, rakonti al ĉiuj homoj, en movadoj kaj solstaraj, ĉie kaj ĉiam, kion ni volas, kaj tio estas afero urĝe necesa. Jam tro longe la esperantistoj laboris aŭ kiel kuriozuloj aŭ kvazaŭ petante pardonon pro sia ekzisto. Ni devas komenci konscie labori por kolekti kaj kunligi ĉiujn bonajn fortojn en ĉiuj landoj. Ankoraŭ ni malmulte signifas. Sed kiam staros kune centmiloj kaj milionoj kaj dekoj da milionoj, la ĉirkaŭmondo vole nevole rimarkos nin kaj respektos nin, kaj fine ni homoj el ĉiuj landoj povos mem decidi pri nia sorto.

Paco kaj kulturo estas interdependaj. Certa grado de kulturo, almenaŭ justosento kaj sento por interhoma kaj interpopola bonkonduco, estas necesa kondiĉo por paco. Laboro por paco sekve postulas laboron por kulturo, precipe por kulturado de bona interkonduco de homoj kaj homgrupoj. Tion oni apenaŭ bezonas klarigi al esperantistoj. Ke la nuna speco de kulturo havas grandajn mankojn, oni bezonas al neniu pruvi per rezonado.

Aliflanke paco estas necesa, por ke la homoj povu senĝene kaj ĉiurilate sekvi la instinkton de kulturado de siaj kapabloj. Ni naskiĝas kun certaj instinktoj por vivteni la korpon kaj vivteni la genton. Simile ni naskiĝas kun diversaj mensaj kaj spiritaĵaj kapabloj kaj kun instinkto por evoluigi ilin, kulturi ilin. Homo fosas, semas kaj diversmaniere prizorgas la teron, por ke ĝi estigu tion, kion li bezonas por sia korpo. Li havas instinkton simile prilabori kaj utiligi siajn mensajn kaj spiritajn kapablojn. Tio es-

tas universala afero. Ekzistas senfine multaj gradoj kaj nuancoj inter geniulo kaj primitiva homo, sed eĉ en la plej malaltnivela sovaĝulo troviĝas tiuj kapabloj kaj instinktoj.

Kulturado de la mensaj kaj spiritaĵaj kapabloj estas esenca afero en la homa vivo. Se la korpo ne ricevas tion, kion ĝi bezonas, ĝi fartas malbone, difektiĝas, detruigatas. Se ni ne sekvas la instinktojn, kiuj diktas la mensan kaj spiritan vivon, ni ankaŭ fartas malbone, la vivado perdas la sencon. Satigo sole de la korpaj bezonoj povas kontentigi estaĵon senspiritan, sed ĝi neniel povas doni sencon al la vivo. Kulturo en tiu ĉi senco sekve estas vivograva afero por la homoj, ĉu en modesta formo de ordinara ĉiutaga homo, ĉu en la formo de geniuloj.

Tial kulturo kaj kulturklopodoj, kiuj meritas la nomon, ĉiam estas serioza afero, eĉ se temas pri komedioj.

Jen manko eĉ granda nombro da nuntempaj homoj: supraĵeco, manko de serioza sinteno al la vivo, al la propra kaj al la vivo kiel tuto. Mankas vivocele, mankas normoj por vivado. Nia tiel nomata kulturo grandparte estas nur distro, tempopasigo, kiu ne evoluigas nin sed narkotas niajn originajn instinktojn de mensa kaj spirita evoluo. Grandparte same efikas teknikaj eltrovoj. Neniu pastro povas tiel elokvente prezenti la instruon de Jesuo, kiel entuziasma flugeksperto prezentas modernan aviadon, nek ricevas li tiom da tutkora atento. Same estas rilate al multaj aferoj. Narkoto postulas novan narkoton, kaj tiel la libera tempo de multaj homoj fariĝas ĉeno de supraĵaj sensacioj, kiuj igas ilin forgesi, ke ili estas homoj, estaĵoj kun respondeco pri la kapabloj en si.

Homoj, kiuj ne vidas sencon en la vivo, ne multe klopodas por konservi aŭ krei pacon. Manko de kulturo signifas detruon de paco.

La diritaj kvalitoj estas karakterizaj ankaŭ por nuntempa literaturo kaj arto en ĉiuj formoj. Mankas serioza sinteno al la vivo, al vivosenco. Sed tiajn verkojn ŝatas modernaj homoj. Oni povas amase kaj pasive legi ilin, same kiel oni povas amase kaj pasive rigardi filmojn, for-

gesante la realon ĉirkaŭ si kaj en si. Sed la vere grandajn verkojn, kiuj estiĝis antaŭ jarcentoj kaj jarmiloj kaj kiuj kiel gvidlumoj markas la spiritan vojon de la homaro kaj montras la direkton, en kiu ni iru — tiujn oni ne konas, ofte eĉ ne scias pri ilia ekzisto.

Kiel povas esti tiel, se ni ĉiuj naskiĝas kun mensaj kaj spiritaĵoj kaj kun instinkto por evoluigi ilin? Kulturo de la tero postulas laboron, zorgon, diligenton. Ne ĉiuj kulturistoj estas energiaj kaj diligentaj. Verŝajne estas same rilate al ni mem. Sur kampoj kreskas kaj utilaj plantoj kaj fiherboj. Se la kulturisto estas maldiligenta kaj ne forprenas la fiherbojn, ili detruas la utilajn. Same troviĝas en ni ne nur bonaj kapabloj sed ankaŭ malbonaj. Se ni ne forsarkas aŭ subpremas la lastajn ili malutilas al la unuaj. Kulturo estas laboro, kaj en materia senco kaj en spirita.

Kiel rilatas la diritaj aferoj al ni esperantistoj? Same kiel la pacproblemo. Ni estas malmultaj, kaj en la regno de kulturo ni estas simplaj servantoj aŭ nur lernantoj. Sed eĉ ĉiuj esperantistoj, kiuj meritas la nomon, eĉ eĉ la malplej instruitaj, mi ĉiam trovis la plej gravan parton de kulturo: seriozan sintenon al la vivo, seriozan serĉadon de vivosenco, seriozan klopodon por kulturi la bonajn kapablojn en si mem. Tio ne estas hazardo, kaj nia lingvo ne ŝanĝis mirakle tiujn homojn, kiuj aliĝis al ĝi. Sed la ideoj de Zamenhof kaj la rimedo, kiun li kreis por paco kaj kulturo, tiris al si ĝuste tiajn homojn. Kaj tiaj homoj troviĝas multaj en la mondo. Ne estas la pli multaj, kiuj faras la plej grandan bruon.

Paco kaj kulturo interdependas: ni devas komenci konscie labori por kolekti kaj kunligi ĉiujn bonajn fortojn en ĉiuj landoj.

Kiam mi skribis la antaŭan paĝon, anoncis la radio, ke rusaj sciencistoj eltrovis novan atombombon, kiu antikv-

igas la amerikan. Nekredeble malgranda maso povas kaŭzi nekredeble grandan detruon.

Ne tre gravas, ĉu la aserto estas vera aŭ falsa. Ne bomboj detruas sed homa malbono. Ĝis oni komencos uzi sian eltrovkapablon por nuligi ĝian ĉenoreakcian forton, oni povas esperi nek pri paco nek pri kulturo.

Eino Leino

De prof. V. TARKIAINEN

Artikolo verkita kaj speciale reviziita por "Malgranda Revuo" de V. Tarkiainen, profesoro de enlanda literaturo en la universitato de Helsinko, kaj tradukita de Vilho Setälä, membro de Esperantista Akademio kaj direktoro de Esperanto-Instituto de Finnlando.

La poeto Eino Leino (prononcu: ejno lejno) naskiĝis en 1878 en Paltamo kaj mortis en 1926 en Tuusula. Lia patro estis termezuristo Anders Lönnbohm kaj patrino el familio Kyrenius. Se oni konjektas pro la nomoj fremdan devenon, oni tamen plene eraras. Ili nur memorigas pri la epoko, kiam la junuloj ricevis en lernejoj novajn nomojn latinajn, grekajn kaj svedajn, ĉar la finnaj estis konsiderataj tro simplaj. La patro estis el Karelia gento kun origina nomo Mustonen.

Eino Leino estis el la finnaj poetoj de sia generacio la plej universala kaj produktema, plej originala kaj suverena. Li estis denaska bardo. La poezio estis lia vera patrina lingvo, kiun li lernis uzi jam en la knabaj jaroj. En siaj unuaj poemoj dum la 1890-aj jaroj li estis ankoraŭ preskaŭ instinkta bardo. Li kantis, kion lia juna koro elvokis kaj kion la ĉirkaŭanta naturo instruis al li: pri somero, hejmo, familianoj kaj vekigantaj revoj de amo. La finna lingvo fleksiĝis senpene en lia kantado. El la sonantaj rimoj kaj malpeze ŝvebantaj imagoj fluis lumo kaj juneco. Apud la finnaj popolkanto kaj arta poezio liaj fruaj modeloj belletraj estis J. L. Runeberg kaj Hein-

rich Heine. Iom post iom la patrolando kaj ĝia popolo l. viĝis super lian horizonton, kaj li evoluis al bardo de sia nacio.

Post la jaro 1900 lia kanto viriĝas. Ĝi atingas sian plejan potencon kaj kulminon, kiam ĝi interpretas la sentospertojn fatalajn al lia propra vivo kaj al lia popolo kaj la heroan menson kaj aplombon el ili devenantajn. Oni trovas tie influon de Nietzsche, Goethe, pli poste de Dante, kaj eble ankaŭ ian resonon de la moderna franca liriko. Sed la plej profundan esencon de sia animo la vervo de la bardo Eino Leino trovis speciale en la poemaroj "Hielkavirsiä" ("Hielka-kantoj"; la nomo pruntita de popolaj baladoj ĉe printempaj fajrofestoj kun antaŭkristana tradicio) de la jaroj 1903 kaj 1916, kiam li apogis al la antikva Kalevala metriko. Simile al pratempa bardo-aŭguristo li ŝveligis la sentenhavon, fatale kreskintan al potenco, per la sorĉa forto de la vorto ĝis grandioza ornama kaj metafora efekto en la diafanaj bildoj legendecaj kaj romantiko baladaj figuroj antikvaj. En ili malfermiĝas perspektivoj de la finnlanda naturo kaj popolanimo tiel vastaj kaj kapturnigaj, ke io simila ne aperis en nia pli frua poezio. En ili vibras antaŭsentoj kaj aŭguroj, kelkfoje korŝire malvarmaj kaj maltimaj, aliffoje pro sia mildeco kortuŝaj kaj ĉarme sopiremaj, kiaj antaŭe ne estis troveblaj en nia literaturo.

Sed Eino Leino vivis en intime firma kontakto kun la ideoj movadoj de sia tempo. Li agis per ĉiuj fortoj por la ideoj de libereco kaj humaneco. Kiel ĵurnalisto li rompadis sian lancon kontraŭ la politika subpremo kaj la kuratora cenzurado de spirito, por la libereco kaj justeco. Kaj kiel poeto li salutis triumftone la liberigajn movadojn de la popoloj kaj ties grandajn spiritajn gvidantojn, tamen ĉiam principe konfesante pacifismon. Li amis la vivon en ĝia plena, universala riĉeco kaj tuteco. Li interpretis la diversajn sentojn de homa koro mirinde delikate kaj senrezerve kaj la severecon de homa sorto profunde kaj kunsentige. La resumo de lia vivkoncepto estis optimismo suprenkreskanta el tragedia fundamento. Kaj la kordoj

de lia liro muĝis ofte per melodioj de uragano, kvazaŭ giganta Eola harpo, kiun la fingroj de la Naturo ludas. La naturo estis la granda resona fundo kaj akompananto de liaj sentoj. Li ne ĉesis laŭdi ĝian neelĉerpeblan riĉecon de impresoj. Li vidis en ĝi la speguliĝon de eterna, panteisma dieco. Kiel vastajn perspektivojn li regis, montras i. a. lia dramo "Alkibiado", en kies heroo li vidas la Helenan harmonion kunfandiĝi kun la azia soifo al senfinco, aŭ en la balado "Belcrofon", kiu estas ditirambo al la supereco de kreanta spirito kaj la senmorteco de arta belco, ankaŭ, kiam la individuo pereas sub la fortoj de fatalo. La zumado de granda arto tonas en la suverenaj versaĵoj de lia viriĝo.

La finna poezia arto multe kreskis kaj rejuniĝis en la kantado de Eino Leino. Ĝi atingis rafinitan pretecon, kelkfoje eĉ luksan brilon en la kantoj, verkitaj per moderna metriko kaj resonantaj la diversajn tonojn de lia poeta animo. Kiel bardo li apogas sin pli al la muzikaj fontoj de la lingvo ol iu finna poeto antaŭ li. Liaj versoj fluas mirinde torente kaj melodie. La vortoj kantas, brilas, floras kaj dancas. Ili vekas aŭguron sed ne klarigas ĝin. Ili fulme lumigas bildon sed ne desegnas ĝin neta. Ofte ili lasas en la animo sonoron, milde karesan kaj eĉ lulantan ondodon de melodio, kiu pli parolas per siaj akordoj ol per la intelekta koncepto.

Eino Leino komprenis kiel principon de sia vivo kaj poezio la luktadon por libereco. "Mi volis esti libera, tute libera. Mi eĉ povas diri, ke mia tuta belletra kariero estis batalo por la libereco", li diras en verkista bilanco de la jaro 1914. Kaj li priskribas tiun celadon al libereco jene: "Nome ne sufiĉas, ke oni foje atingas la liberecon. Oni devas konstante lukti pri ĝi, tiel pri la ekstera kiel pri la interna libereco. Kie tiu luktado ĉesas, finiĝas la vivo, ĉio mortas, rigidiĝas, veneniĝas kaj putras. — Mi konsideras la lukton pri la libereco la plej alta, la plej senmorta morala celo de ĉiu homo." Tion, kiom la celado al libereco havas sian fundamenton en la vivanta forto de interna kreskado kaj devenas de la bezono efektiviĝi sian indivi-

duon, ĝi vere ne estas malrespektinda programo de poeto. Per ĝi Eino Leino evoluis al senantaŭjuĝa animo, leviganta super multajn naciajn kaj literaturajn konvenciaĵojn.

Per siaj denaskaj kapabloj lirikaj, per la delikata, senrezerva impresemo, profunda kaj interna inspiro, kaj per la malofta melodieco kaj ardo de sia esprimo, Eino Leino gravuris sian nomon solide en la oran libron de finnlanda literaturo. Kaj komprenema animo ne povos malatenti pri la vera genio, kiu malkaŝas sin en la plej bonaj produkt-aĵoj de lia poezio.

Poemoj de Eino Leino

Truplena koro.

Ve, ve, via koro, knabino kara,
ve, mia malbona sorto!
Tro multaj fenestroj de via koro
malferme rigardas al korto.

Kelkfoje mi mem tie sidis interne
kaj pasis la tuta vespero.
Sed huu ... la vento kaj brr ... la ventego —
mi tian ne spertis sur tero.

Se iu ne kredas, li provu viziton —
al tio mi diras nenion.
Ke tamen vi mem la froston ne sentas,
neniam komprenas mi tion.

Tradukis Vilho Setälä.

Vin rigardis mi, fraŭlino —

Vin rigardis mi, fraŭlino
kiel knabo novludilon,
vin aŭskultis mi, fraŭlino
kiel arbaro printempa
kanton de ora kukolo.

Mian bruston vi florŝutis,
mian ĝojon vi elkantis
kaj printempsopiron vekis,
melodion ĝian vokis
por murmuri riverete,
el kantelo* resonadi
subtenata de la ventoj,
reĵetata de la montoj.

Tia nun la ĝojo mia:
kiel knabo sen ludilo,
tia nun la vivo mia:
la printempo sen kukolo,
monto silentas, floro forestas,
blua arbaro malgaja.

Tradukis Vilho Setälä.

Legendo

Rakonto diras, ke Savanto foje
kun Petro estis tra la mond survoje
kaj, trans larĝa spac de akvo, tero
atingis Suomi en somervespero.

Eksidis ili kune sub betulo
sur klina bordo de duoninsulo,
interparolis multe kiel ĉiam,
sed sankta Petro diris tiam:

Jen, Majstro, lando! Stranga mondangulo!
La homo preskaŭ muta, dorskurbulo!
Kaj vidu rokojn! Malfeliĉa tero!
El ĝi apenaŭ kreskos fungo, bero!

Ridetis Dio je prijuĝo moka;
jes, diris, grundo estas tute roka,
por fruktoj, grenoj varmo ne sufiĉa,
sed homa koro estas varma, riĉa.

Dirinte tiujn vortojn li ridetis.
De li rideto sin sur akvojn metis:
sekiĝis marĉoj kaj el nub irante
la suno longe brilis ridetante.

*) Finna kordinstrumento.

Ekstaris ili kaj daŭrigis vojon,
sed oni diras, ke eĉ nun multfojon,
se sub betulo sidas vi vespere,
ridcton vidas vi ĉielan tere.

Tradukis *G. J. Ramstedt.*

La preĝejo del infano

Aŭdu kiel sonoriloj
vokas trans arbar al templo:
poŭ paŭ, poŭ paŭ!

Aŭdis li tion infane
ĉe la pord de hejm mizera,
en la sino de patrino
meze de blua arbaro.
Ŝonis mont, respondis monto,
ĉirkaŭiris sankta eŭo.
Ekdemandis infaneto:
panjo, kiam ni iros tien,
kie estas julpreĝejo?*

Diris panj: alian fojon,
kiam vi kreskis iome.

Kreskis la knabo iome,
paŝis jam ĝis la pordego,
vidis en arbar distanca
vojon preĝejan perdiĝi.
Tuj li kuris al la hejmo:
"Mi jam vidis la jultemplon!"

Diris panjo: kian templon?

"Antaŭ mi fenestroj grandaj
kaj tegmento ĝis la nuboj
subtenata de pilastroj
de la tero ĝis ĉielo.
Panjo, kiam ni iros tien,
kie estas julpreĝejo?"

Milde la panjo ridotis:
kiam vi havos novan veston.

*) Jul — skandinava vorto por kristnasko.

La knabo ricevis la veston,
venis fine en preĝejon,
vidis li veran vekturon,
en la turo sonorilojn;
venis al la hejmo plore
kun larmoj kaj kun sopiro:

"Mia templo, la pli bona,
staris inter pinkolonoj;
nun mi ankaŭ tiun perdis."

Kaj neniam li renkontis
plu dum vivo nek ĉe morto,
ankaŭ ne en postmortejo
la templon del blua arbaro.

Tradukis *Vilho Setälä.*

Nokta odo

Tondras en animo mia,
mallumega pro doloroj,
bluaj fulmoj flame flagras
super la montaro nokta.

Kapturnigaj mensabismoj
tonas pro la kant Hadesa;
estu nokto mia ĝojo.

Nokta estu mia domo,
pri la nokto sonu kanto
dum mi odas el sub tero
pri la akvoj malserenaj
kaj jam kaŝas la tagastron;
mi tremigas firmamenton.
Tonoj del krevinta koro
el profundoj de la nokto
skuas tronon de la Dio.

Mi dolorojn interpretos
kiel taga fantomego,
frato de la suferantoj,
bardo de la kulpaj koroj.

Kulpaj? Kio estas peko?

Kreis vi dezirojn, Dio,
metis ĉie palisaron:
"Ne transpasu tiun limon!"

Sed mi ĝin transpasos
spite al ordon de Dio
nekonata. Mi ne petis
didonacon, mian vivon,
mi pri ĝi ne dankos vin.

Tradukis Vilho Setälä.

Espero de senmorteco (Fino de la kantato.)

Ne ekzistas vivo tuta
nek la morto absoluta.
Ĉies morto nur laŭ tio
kia estas lia menso,
ĉiu havas senmortecon
kian li postuli sciis.
Se vi grandan verkon kreos,
vi kun via verko vivos,
se vi revas belan sonĝon,
vi kun via sonĝo vivos.
Se vi faros kanton faman,
vi flugados kun la famo,
aŭ dentradon rotacian,
vi kun ĝi rondiri ĉesos.
Se vi naskos filon bravan,
vi kun gento via vivos,
kverkon sanktan se vi plantos,
falos vi kun arbo aĝa,
se kolektos vi mamonon,
vi en ter, mamono vivos,
se postrestos rememoro,
nur kun ĝi vi disbloviĝos.

Tradukis Vilho Setälä.

Kio pli bela

Kio pli bela:
kredi, ke venkos baldaŭ libero,
fidi triumfon de lumo kaj vero

kaj lukti fidele por lumo?
aŭ nur batali
konvinkita: ne estos lumero,
certa pri falo de la libero,
kaj tamen batali?

Kio pli bela:
pensi: se venkos neniam libero,
mediti: se estingiĝos lumero,
kial mi tiam batalus?
aŭ ĉu pensadi:
naskiĝis mi antaŭ la sunsubiro,
heroo de lumo, ne del akiro:
falo al mi estas vivo.

Tradukis Vilho Setälä.

Perdita melodio

1.

Heroaĵon mi iam celis:
elizeon sorĉi sur ter.
Nun sidas mi sola, soleca,
tiel pasas la tagoj for.

De mateno kaj ĝis la vespero
al angulo fiksita rigard,
kaj larmoj varmegaj fluas,
ne estiĝas eĉ eta akord.

2.

Jam multajn kantojn mi faris,
sed unu belega plej,
kun kara motivo, ve,
mi fatale forgesis ĝin!

Mia estis ĝi, kanto del sorto,
melodio brilanta del venk.
Tagnokte mi ĉiam serĉas
ĝin en fundo de mia kor.

Kaj jaroj pasas, pasadas,
estingiĝas la brul del okul.
Tio tute egala, se foje
retroviĝus pasinta belec!

La amikoj ĉirkaŭe maldensas
kaj griza jam iĝas harar.
Tio tute egala, se ree
foje sonus unua la am!

3.

Aŭskultu! Nun sonas akordo.
Mi fine retrovis do ĝin.
Temp estas nun kanti, ho cigno,
kaj morti kun ton, melodí.

Nun aŭdu, mi odon akordas
pri fulge nigra harar,
kiel milo da pensoj ekfulmas
en pupilo del brila okul!

Ĉu vi vidis talion gracian
dum ŝi naŝas super florar?
Estas ŝi, mia revo supera,
fraŭlino del sorĉa nebul! ...

La larmoj varmegaj fluas,
aŭdiĝas sole sopir
kaj kord del kantelo senforta
ŝirkrias, silentas, ho ve.

4.

Senespera mi ĉiam serĉas,
konstante zumetas la lip.
O, helpu nun Dio, kompatu,
mallumiĝas mia prudent.

5.

Jam revoj kirliĝas torente,
la poemoj sin levas en ŝaŭm,
kaj supren la blankan brakon
marnimfo eklevas el ond.

Ĉu vi vidas la belan rigardon?
Ho, lasu min iri jam for!
Mi volas promeni kun nimfo
en la freŝa parko del mar ...

Jen, ĉiu rigardas strange!
Ĉu iln ravas la kant?
Ho, vane mi frapas kantelon
senkordan, sur la genu!

(V.S.)

Mi kaj mia helpanto

(Interparolo inter mi kaj konato.) De P. TH. JUSTESEN

Li: Helpanto! Kiun vi celas parolante pri via helpanto?

Mi: Mia helpanto estas mistera ulo, kiu gvidas mian animan vivon. Li regas miajn pensojn kaj tiel ankaŭ mian praktikan vivon.

Li: Tre mistera ulo! Ĉu vi iam vidis lin?

Mi: Certe ne. Sed mi ĉiun tagon aŭdas lin.

Li: Ĉu vere? Bedaŭrinde, ke vi ne povas montri lin al mi.

Mi: Lin mem mi ne povas montri, sed liajn agojn.

Li: Ekzemple?

Mi: Ekzemple li konsilis al mi, ke mi menciu lin al vi por fari vin pli saĝa, ol vi ĝis nun estis.

Li: Vere! Kaj vi kredas, ke tio konvinkos min?

Mi: Tute ne. Mi ŝercas. Sed eble mi povus rakonti al vi okazojn, kiuj vin konvinkus.

Li: Bonvolu!

Mi: Bone. Mi do rakontos okazojn, kiujn spertis bonaj amikoj de mi, kaj kies fidindecon mi kuraĝas garantii.

Li: Bonvolu!

Mi: Iu mia amiko, kiu estas samaĝa kun mi, iom pli ol sepdekjara, antaŭe instruisto en altlernejo, rakontis al mi la jenon: Antaŭ kvardek ses jaroj mi estis teologia studento kaj staris ĝuste antaŭ mia skriba ekzameno, la lasta. Iun nokton mi subite vekigis, aŭdante voĉon, kiu

diris: "Bonvolu skribi pri La Agoj de la Apostoloj, ĉapitro 7, versoj 5 ĝis 10!" — La nombroj estas arbitraj. Mi ne memoras la verajn.

Li: Bone, bone! Kio okazis plu?

Mi: Simple tio ĉi. Du aŭ tri tagojn poste li sidis en ĉambro en la universitato kune kun la aliaj kandidatoj, atendante la temon, pri kiu ili skribos. Profesoro eniras la ĉambro, malfermas paperon kaj diras: "Bonvolu skribi pri La Agoj de la Apostoloj, ĉapitro 7, versoj 5 ĝis 10!"

Li: Sufiĉe strange.

Mi: Jes. Komprenble mia amiko estis preparinta sin speciale por skribi pri tiuj versoj, kaj li solvis sian taskon eksterordinare bone.

Li: Mi ne dubas. Kia feliĉulo!

Mi: Jes. Sed ĉu tio estas konvinka?

Li: Konvinka! Konvinka! Se mi mem estus la spertinto!

Mi: Sed mi ja diras, ke mi havas la rakonton de la spertinto mem, kaj li estas absolute fidinda.

Li: Mi ne volas kontraŭdiri, sed — — —

Mi: Komprenble "sed". Sed se vi volas, mi rakontos alian kazon.

Li: Mi tre volonte aŭskultos.

Mi: Alia amiko, ankaŭ pli ol sepdekjara, antaŭe juĝisto, havis antaŭ ĉirkaŭ kvardek kvin jaroj — mi ne ekzakte memoras la jaron — fileton, kiu pasigis feriojn ĉe sia avino. La knabo havis proksimume ses jarojn. Li estis jam plurfoje vojaĝinta per vagonaro. Jen iun tagon li staris kune kun sia avino sur la kajo de la fervoja stacio, tre ĝoja, ĉar nun li kune kun la avino vojaĝos al sia hejmo. La vagonaro alvenas, kaj ambaŭ gaje iras al la ŝtuparo de la vagono. Sed en la momento, kiam la knabo metas sian piedon sur la ŝtuparon, li komencas krii kaj protesti. "Mi ne volas eniri tiun ĉi malbonan vagonaron!" li kriis. "Mi ne volas! Mi ne volas!" La avino provis trankviligi lin, sed la protestoj estis tiel akraj kaj persistaj, ke fine ŝi rezignis, telegrafis al la gepatroj, ke oni venos per sekvanta trajno, kaj atendis. Kiam venis la sekvanta trajno,

estis nenia malfacilo. La knabo estis tre kontenta, kaj vojaĝis kune kun sia avino al la hejmo. Sed la unua trajno estis tiu malfeliĉa, kiu akcidentis ĉe Gentoŭte, proksime al Kopenhago, okazo, per kiu tre granda nombro da homoj perdis la vivon!

Li: Tre stranga koincido!

Mi: Koincido! Kaj tio vin kontentigas?

Li: Mi ja devas kontentiĝi. Kion fari?

Mi: Sed min tiu vorto ne kontentigas. Mi ne estas tiom modera en miaj postuloj. En la okazo pri la studento mi diras, ke li havis helpanton, kiu informis lin pri grava afero, kaj en la dua okazo tute same mi diras, ke helpanto protektis la knabon kontraŭ minaca akcidento.

Li: Tia estas via inkline.

Mi: Kaj la via? Kion diras vi pri la afero?

Li: Kion mi diras? Mi diras nenion. Kion diri pri tiaj aferoj?

Mi: Pri ĉiuj aferoj en la vivo ni devas diri ion. Mi ne povas kaj ne devas preteriri ion ajn sen formi opinion, serĉi klarigon, komprenon.

Li: Ofte tre malfacila afero. Ni ja scias relative malmulte.

Mi: Certe. Tamen ni estas pensantaj homoj, ne papilioj aŭ vermoj, kiuj manĝas, naskas, dormas.

Li: Jes, sed ofte rezigno estas necesa.

Mi: Jes, sed malfacila. Almenaŭ mi faras al mi ian klarigon. Kaj vi?

Li: Mi ne. Vi ja ne aprobas la konjekton pri koincido.

Mi: Ne.

Li: Mi ne povas percepti la diferencon inter vi kaj via tiel nomata helpanto.

Mi: La helpanto diras al mi ion, kion mi ne scias kaj ne povas scii.

Li: Bone. Sed la kazoj, kiujn vi diris, estas ja ne ĉiutagaj.

Mi: Certe ne. La ĉiutagaj estas ja malpli interesaj.

Li: Tamen donu ekzemplon!

Mi: Bone. Sed unue tion ĉi: Alia inter miaj maljunaj

amikoj havas filon en Kanado. Antaŭ kelkaj jaroj li sonĝis matene en la lito, ke li estas en sufiĉe kruda ĉambro kune kun kelkaj viroj. Unu el ili venas al li kaj diras: "Telefono al vi. Via filo deziras paroli kun vi." Li vekigis. Momenton poste li aŭdis la sonorilon de la antaŭpordo, kaj tuj post tio la servistino frapis la pordon de la dormĉambro: "Telegramo al la poliestro!" — "Bone, metu ĝin sur la tablon!" li respondis. Kelkajn minutojn poste li eniris la salonon por legi la telegramon. Estis tre grava kaj tute neatendita sciigo de lia filo en Kanado.

Li: Tio estas ja la tiel nomata transigo de pensoj.

Mi: Vi do akceptas ion tian?

Li: ŝajnas ja, ke io tia okazas.

Mi: Jes. Sufiĉe ofte.

Li: Sed ĉu en tia okazo oni povas paroli pri helpanto?

Mi: Eble ne; sed tia okazo montras, ke en nia kapo ni havas specon de ekrano, sur kiu iu, helpanto aŭ ne helpanto, kapablas skribi aŭ desegni, kaj estas ĝuste tiu ekrano, kiun la helpanto uzas.

Li: Sed ĉu vi mem havis tiajn spertojn?

Mi: Certe. Mi havis eĉ kelkajn sufiĉe neordinarajn, sed ĉefe mi havis sennombrajn ĉiutagajn. Sed nun ni parolu ne pri mia helpanto, sed pri via.

Li: Mi konas nenion.

Mi: Estas via manko. Li tre bone konas vin.

Li: Ĉu vere?

Mi: Jes. Jen, kion vi faras, kiam vi havas la taskon solvi matematikan problemon?

Li: Mi koncentrigas min pri la tasko kaj kolektas miajn matematikajn sciojn.

Mi: Ĉu vere? Kiamaniere vi "koncentrigas vin"? Tio ja estas nura vorto, kiu klarigas al ni nenion.

Li: Mi ne havas pli bonan klarigon.

Mi: Eble tamen. Kaj vi "kolektas"! Vere vi kolektas nenion.

Li: Mi kredas, ke jes.

Mi: Ne. Mi diru al vi, kion vi faras. Vi purigas la ekra-

non. Vi forpelas ĉiujn aliajn pensojn, kaj poste vi simple atendas.

Li: Atendas?

Mi: Jes. Vi faras nenion. Vi simple atendas. Kaj poste la helpanto skribas aŭ desegnas sur la ekrano. Provu! Kion faras laŭ via supozo via filo en tiu ĉi momento?

Li: Li sidas sur la benko en la klaso.

Mi: Kiamaniere vi povas scii tion?

Li: Mi simple pensas.

Mi: Ne. Vi tute ne pensis. Vi forviŝis min kaj ĉion tion ĉi de la ekrano, kaj poste la helpanto desegnis sur ĝi vian filon sidanta en la klaso.

Li: Vi tion esprimas tiel!

Mi: Ne estas esprimo. Estas proksimiĝa priskribo. Sed vi ne havas iun ajn priskribon.

Li: Mi kredas —

Mi: Ho! Vi kredas? Mi kredis, ke vi tute ne kredas.

Li: Mi tute ne kredas. Sed mi supozas, ke mia "nepri-skribo" estas same bona kiel via priskribo.

Mi: Jes. Ĉiu porkino preferas siajn proprajn porkidojn. Sed aŭskultu! Supozu, ke poŝt oficisto havas okazon ŝteli tre valoran monleteron. La cirkonstancoj estas eksterordinare favoraj. Li ne povas kontraŭstari la tenton. Li ŝtelas la monon. Poste: kio okazos?

Li: Supozeble li havos malbonan konsciencon.

Mi: Konscienco! Kio estas konscienco? La helpanto diros al li: "Tio estis malbona! Tio estis malbona!" kaj li daŭre diros tion kaj faros la ekziston netolerebla por la malfeliĉa poŝtisto.

Li: Estas ja la pli bona parto de la homo.

Mi: Jes, la pli bona parto de la homo, nome la helpanto.

Li: Estas simple li mem.

Mi: Ne. Fariĝos lukto inter la homo kaj lia helpanto. Oni ne povas lukti kontraŭ si mem. La poŝtisto verŝajne volus mortigi tiun voĉon, se li povus; sed ne estas eble mortigi ĝin, ĉar ĝi estas la voĉo de la nesubstanca helpanto.

Li: Sed kial tiu helpanto ne helpis lin malhelpante la ŝtelon?

Mi: Jes, kial? Eble li momente estis malforta. Eble ni havas ankaŭ malhelpantojn.

Li: Tiamaniere la rilato fariĝas komplikita.

Mi: Jes. La ekzisto sendube estas tre komplikita. Ni ne forgesu tion.

Pri filmo

De EINAR HULT

Multspecaj estas la amuzajoj, per kiuj la multnombraj "amuzentreprenoj" provas altiri intereson kaj monon de la amuzavida publiko. Unu el la plej popularaj sendube estas la filmo, kiu de sia unua apero sukcesis konservi sian potencon super la homoj. Ĝia populareco eĉ kreskas tagon post tago kaj jaron post jaro. Nur en Svedujo troviĝas pli ol 2000 kinejoj kun sidlokoj por 535.000 personoj. — La filmindustrio el komerca vidpunkto do ludas tre gravan rolon kaj estas tre profitdona. Sed samtempe la filmindustrio pro la ĉiam kreskantaj postuloj de la publiko devas pagi milionojn da kronoj por produkti tiajn filmojn, kiuj havu ŝancon kontentigi la kinejpublikon.

En la infanaĝo de la filmo la publiko ne estis tiom pretendema, kaj tiam la kostoj ne estis tiom altaj. Por financi la grandajn kostojn la filmproduktantoj devas per multekosta reklamo altiri la intereson de la kinejpubliko, por ke ĝi plenigu la kinejojn. Ke la reklamo estas sukcesa, montras la plenplenaj kinejoj, kie granda nombro da personoj ĉiuvespere kun streĉa intereso sekvas la dramojn aŭ komediojn, kiuj aperas sur la ekranoj. Neniu povas pridubi la aserton, ke la filmo estas la plej populara el la amuzoj.

Sed, ĉu la filmo meritas tian popularecon? Ĉu la publiko ricevas sufiĉan kompenson por la mono, kiun ĝi oferas? Pri tio eblas diskuti. Kaj krome, la kinejoj logas la homojn de hejmoj, preĝejoj, prelegoj kaj studrondoj. La filmo do estas sukcesa konkuranto al la idealistaj movadoj, kiuj grave suferas pro la malfacila konkurenco.

Estas facile kompreni la amuzavidon de la publiko, kiu pro enuiga laboro en fabrikoj, kontoroj ktp. certe sentas bezonon iel amuziĝi en la liberaj horoj. Jes, la publiko certe emas por kelkaj horoj forgesi la ofte malagraban kaj streĉan batalon por akiri la vivtenon. Krome ĉiuj homoj en certaj momentoj emas revii kaj fantazii... kaj kiu loko estas pli taŭga kaj konvena ol kinejoj? Per helpo de la montrataj bildoj sur la ekrano la fantazio kondukas la homojn al fremdaj landoj, kaj tie ili "mem" travivas aventurojn simile al la filmsteloj. Kun streĉa intereso la kineja publiko sekvas la agojn en la filmo kaj partoprenas la ĝojon aŭ malĝojon de la filmaktoroj. Volonte oni forgesas, ke la prezentataj dramoj estas konstruitaj nur por distri la homojn kaj tial nur malofte povas okazi en la reala vivo!

Malriĉuloj, kiuj vizitas kinejojn, ja ĝenerale ne emas vidi filmojn, kiuj montras la vivon kaj mizeron de aliaj malriĉuloj, sed tiuj pli ĝuas rigardante la vivon de tiaj personoj, kiuj vivas sur la suna flanko de la vivo. Kampanoj ŝatas rigardi filmojn, kiuj montras la pulsantan vivon en la grandurboj kun ĝiaj vigla trafiko kaj abundo da lumreklamoj. Urbanoj siaflanke ĝuas kaj distriĝas per filmoj, kiuj montras idiliajn kaj belajn bildojn de la kamparo. Ĉiu homo en la kinejoj havas okazon vidi ion, kio interesas, ĉar la filmo ja "vidas" kaj "aŭdas" ĉion.

El eduka vidpunkto la filmo do povas ludi certan rolon, kvankam la rezulto de ĝia edukado ne ĉiam estas la dezirata. Sendube la kritikantoj de la filma edukado pravas en tio, ke la filmindustrio grave kontribuis al la malboniĝo de la moralo de la junularo kreante certan "stelkulturon". La junuloj estas tre lernemaj, kaj ili facile kaj kun ĝojo "kopias" la famajn filmstelojn. Ne nur iliajn mo-

dojn sin vesti sed ankaŭ iliajn malvirtojn. Per la prezentado de granda nombro da filmoj, en kiuj ofte aperas erotikaj kaj intimaj amoscenoj, la scivolemo estas vekata. Se oni kritikis la filmproduktantojn pro ĉi tiu afero, ili respondas, ke dependas de la publiko mem. Morale bonaj filmoj tute ne estas popularaj, kaj oni ne emas produkti filmojn, kiuj donos malprofiton.

Kion diri pri tio? Ĉu vere la plimulto el la rigardantoj emas kaj ŝatas vidi nur tiajn filmojn, kiuj estas pli malpli nemoralaj? Kion fari por plibonigi la guston de la publiko? Ĉu tio eĉ eblas? Ĉu tiuj pravas, kiuj kulpigas la kamparan kinejpublikon pro la malalta nivelo de la enhavo de la filmoj? Ĉu ne male estas tiel, ke ni nur malofte kontentas post kineja vizito kaj povas doni bonan ateston pri vidita filmo? Kion la filmoj enhavu, por ke ĉiuj rigardantoj sentu sin kontentaj?

Kiu kapablas kontentige respondi la suprajn demandojn? Ĉu ni eble fondu studrondojn, en kiuj oni aranĝu diskutojn pri filmoj kaj tiamaniere konatiĝu kun la gusto unu de la alia? Tiajn studrondojn oni jam starigis en kelkaj lokoj, kaj eble ni pro tio povas esperi pri pli alta nivelo de la filmoj en la estonteco. Ni montru al la filmproduktantoj, ke la gusto de la publiko ne estas tiom malbona, kiom ili volas kredigi!

Bedaŭrinde ne eblas al ĉiu el ni kompreni la lingvon de la eksterlandaj filmoj, kiuj de tempo al tempo aperas. Ĉar ni ne mem komprenas la parolon de la eksterlandaj aktoroj, ni devas kontentiĝi per pli malpli bona traduko de la filmteksto, kio tre malhelpas la ĝuon. Tio estas malavantaĝo, ĉar ĝenerale la eksterlandaj filmoj tre superas la svedajn. Tio ankaŭ malfaciligas nian prijuĝon pri la enhavo de tiuj filmoj kiuj iel kaptas nian intereson.

Dank' al la eksterlandaj filmoj nia intereso por fremdaj landoj kaj popoloj eble vekigis kaj eble instigas nin al pli profundaj studoj pri la vivo de aliaj popoloj. Se ili havas pli bonan moralon ol ni, ni montru nin same lernemaj kiel la junuloj, kiam ili kopias la filmstelojn! Sed se la fremdaj popoloj ne havas ion bonan lernigi al ni, ni estu

singardaj, ĉar ni ne forgesu, ke ne estas oro ĉio, kio brilas. Ni memoru ekzemple ke la naciistoj utiligis la filmon por popularigi sian "ismon"! Granda nombro da rigardantoj de tiuj filmoj certe estis influataj de la propagando. Sed alie la filmo certe povas fari multon por plibonigi ne nur la moralon sed ankaŭ la civilizacion. Per montrado de filmoj, kiuj montras la suferojn de la kompatindaj soldatoj en milito oni tute certe faras bonan agitadon por paco inter la popoloj. Se oni utiligas la filmon tiucele, neniu rajtas ĝin kritiki, sed male devas senti kontenton.

La situacio en Java

La legantoj de MR eble ŝatus iom ekscii pri la situacio en Java. Tio estas ne ebla por homoj, kiuj ĉerpas nur el la novaĵoj de niaj "neŭtralaj" kaj tre malmulte interesitaj nordaj ĵurnaloj. Mi tial tradukas artikolon, kiun mi trovas en la nederlanda ĵurnalo "Algemeen Handelsblad de la 3a de januaro. La aŭtoro ŝajnas al mi esti sobra persono, kompetenta prijuĝanto de la situacio en Java. Lia nomo estas Leonhard Huizinga. Li skribas:

La dioj de hodiaŭ kaj morgaŭ

Hodiaŭ demandis min naivulo, kiu antaŭ kelkaj tagoj venis el la patrujo kaj surteriĝis en la sorĉista kaldrono, kiu nomiĝas Java: "Kial ĉiu parolas pri intertraktoj kun la naciistoj?" Ĉu oni vere estas konvinkita, ke ili efektive reprezentas la plimulton de la popolo de Java?"

La viro el la patrujo ne ŝajnis tiel naiva kiel li ŝajnis. Mi do funde pripensis antaŭ ol mi formulis respondon.

"Ne", mi fine diris. "Mi ne kredas, ke oni supozas, ke la naciistoj estas reprezentantoj de la plimulto."

"Sed almenaŭ de konsiderinda malplimulto?"

"Ne", mi diris. "Ankaŭ ne."

*) La vorto uzata en la ordinara, laŭvorta senco.

Li rigardis antaŭ sin kaj demandis: "Kiuj estas la naciistoj?"

"Kie? Tie ĉi en Java?"

"Jes. Ĉu estas ankaŭ aliaj?"

"Kompreneble. En Sumatra kaj en multe pli granda skalo en Borneo kaj Celebes."

"Mi nun demandas sole pri la naciistoj en Java", li diris.

"Krude oni povas dividi ilin en tri grupojn. La unua efektive konsistas el nur du personoj, Soekarno kaj Mohammed Hatta, la politikaj heredantoj de la japanoj."

"Ili ne interesas min", diris la viro el la patrujo. "Ili devas esti ellasataj en kiu ajn intertrakto de registaro kun mem-estimo."

"La dua grupo", mi daŭrigis, "estas la 'pemoedas', la ekstremistoj, aŭ kiel vi preferas nomi ilin. Preskaŭ senescepte ili estas junuloj, de la japanoj incititaj al tia malamo kaj blinda fanatikeco, kiun ni en Nederlando ekkonis ĉe la infansoldatoj de la Hitlerjugend."

"Do la viroj, kiuj rabas, murdas kaj atakas la tendarojn kun vivinoj kaj infanoj?"

"Jes. Bedaŭrinde oni ne povas nei tion. Vi tute ne troigas. La trian grupon ni provizore nomu tiu de Sjahrir. Sufiĉe modera viroj malgraŭ la nepravigebla lingvo, kiun ili uzas, por ne veni en konflikton kun sinjoroj naciistoj. Sendube ili antaŭ ĉio preferus interkonsenton kun la nederlandanoj, sed ili ne povas aŭ ne kuraĝas batali kontraŭ la ekstremistoj, kiuj estas la veraj potenceuloj en la 'Indonesa Respubliko', fakta potenco, kiu estas bazita ekskluzive sur la pafarmilaro, per kiu ĝi povas esti subtenata."

"Se mi vin bone komprenas", diris la viro el la patrujo, "tiuj ĉi viroj el la grupo de Sjahrir, se ili starus libere kontraŭ siaj propraj ekstremistoj, povus esti akceptindaj al ni kiel naciistoj."

"Certe. Tia estas la ĝenerala koncepto, ne nur en la rondo de la registaro sed ankaŭ ĉe granda parto de la nederland-hind-ujna publiko."

"Tre interese", li diris, "sed ĉu nun estas permesata unu demando? Kiujn reprezentas tiu grupo? Ĉu vi vere kredas, ke la granda amaso el la vilaĝaro rigardas tiujn virojn kiel siajn reprezentantojn?"

"Tre malfacila demando. Generale oni ankaŭ nun supozas, ke la granda amaso, do la javana vilaĝaro, pli preferas la kvieton kaj la juran protekton, kiujn la nederlanda estro antaŭe garantiis, ol kiu ajn politikon, kaj certe ol la teruron kaj ĉiam

minacantan malsatmizeron, kiuj estas konsekvenco de foresto de ĉia estro en Java."

"Vere", li diris. "Nun ankoraŭ unu demandon. La grupo de Sjahrir do estas, se mi vin bone komprenas, malgranda intelekta supertavolo de viroj, kiujn oni povus karakterizi kiel idealistojn, se ili ne kunirus kun Soekarno kaj kompanio unuflanke kaj kun la ekstremistoj aliflanke. Do supertavolo, kiu ĝis certa grado estas apartigita el la granda loĝantaro?"

"Kiel ĉiu supertavolo kaj ĉiu idealisto en ĉiu lando."

"Konsentite", li diris. "Mi demandas tion nur por klarigi al mi mem ilian pozicion. Tiel ankaŭ pri mia sekvanta demando: Ĉu estas grupa, intelekta supertavolo ankaŭ de tute lojalaj elementoj?"

"Sendube ... Tio estas, oni ne scias, kiom restas de tiu grupo. Sennombraj lojalaj indonesanoj jam estas murditaj de la ekstremistoj. Kio fariĝis el la nepre lojalaj regantoj kaj aliaj en la centraj partoj de la insulo, ni ĝis nun ne scias, sed la informoj estas teruraj. Oni povas supozi, ke la iel konsiderindaj javanoj, hindeŭropanoj, kiuj ne troviĝis en la tendaroj, kaj la nederlandanoj, kiuj tie kaj tie interniĝis, estas parte mortigitaj aŭ ekstermitaj."

"De la ekstremistoj?"

"Jes. En la nomo de libero kaj demokratio."

Dum iom da tempo li pripensis. "Estas iom strange", li fine diris, "ke oni en la nomo de demokratio intertraktas kun malgranda malplimulto pri la sorto de milionpopolo. Vere ni do altrudas al la plimulto de la javanoj, kies opinion ni ne konas, certan grupon de naciistoj kiel gvidantojn."

Mi silentis.

Li pensante daŭrigis: "Estas io kruela en tio, ke neniu parolas pri intertrakto kun la lojalaj javanoj."

"Ili ja ĉiuokaze iros kune kun ni", mi nesingarde diris.

"Guste tiel!" li atakeme elkriis. "Tial ne necesas kalkuli pri ili. Ni oferas nur al la dioj de hodiaŭ."

"Eble", mi hezite diris, "la dioj de hodiaŭ estos la dioj de morgaŭ."

"Tion mi ja atendis!" li elkriis, kaj liaj okuloj brilis pro indigno. "Se ni prizorgas esti bonaj amikoj kun la dioj de morgaŭ, la resto ne gravas!"

"Ne!" mi diris, kaj nun ankaŭ el miaj vortoj sonoris la forto de konvinko, "se ni prizorgos, ke la dioj de morgaŭ estos bonaj dioj."

Tradukis P. Th. Justesen.

Memoraj rebriloj el la arbaro

De L. A. BERGSTROM

Eble vi post mallonga informo pli bone sentos la enhavon en la sekvanta simpla priskribo: la verkinto, iam arbarlabora oficisto, estas nun de 26 jaroj disigita de la libera naturo per la muroj de mensa malsanulejo — ŝajne senkaŭze. Dum la lasta duono de tiu tempo li lernis inter alie esperanton, sola, per helpo de koresponda kurso, per legado kaj skribado.

Printempigas, sed la vintro ne cedis. En la arbaro kuŝas ankoraŭ neĝo kiel tombovesto sur la tero.

La tagoj plilongiĝas. Kontraŭ la subiranta suno, kiu pentras la horizonton ruĝa, estas malproksimaj, bluaj montodorsoj, kaj kontraŭ ili staras la arbaro malhelverda. Super la montoj ŝvebas la aero, kvazaŭ fumvualo sub la rozkolora ĉielo. La tagoj estas mildaj — signo de venanta printempo. La naturo komencas vekigi. Plivigliĝas la besta vivo en la arbaro.

Progresas la printempo. Plaŭdeto el arbaraj riveretoj miksiĝas kun venta susuro en la branĉaro de la arboj. Jen pego tamburas sur seka pino, sonadas kantado de tetroj. Urogaloj kolektiĝas en seksludaj lokoj kaj preparas sin por venontaj bataloj, kiam prezentos sin ankaŭ la urogalinoj.

La printempo vere enmarŝis, kiam la neĝotavolo preskaŭ fordegelis pro varmaj sunradioj kaj milda vetero. Tie kaj tie troviĝas loketo kun neĝo, kaj en ombraj lokoj ĝi ankoraŭ kovras la teron, sed persiste milda vetero promesas finon de la vintro.

Motaciloj anoncas la printempon. Trotpaŝete ili kuras en kortoj aŭ suprenflugas kaj sidiĝas sur tegmentaj defluiloj. Unu birdo post alia aperas. Muŝikapo jam esploras la pasintomeran neston.

La tagoj pli kaj pli longiĝas, la noktoj estas helaj. En la arbaro kantas la rubekolo. Ĝi ĉesas nur malfrue vespere, kaj tiam la skolopo komencas sian ardflugon, kiu estas

facile rimarkebla pro la karakteriza sono "knisp, knisp knorr, knisp, knisp, knorr".

Stranga sono vibras tra la aero, plej simila al blekado de kaprino. Estas galinago, kiu en spiraloj faras ardflugon. Kiam ĝi en flugado malleviĝas, ĝi etendas la vostajn plumojn, la aero trapenetras inter ilin, kaj tio kaŭzas la strangan sonon.

Ranoj kvakas kaj havas sekskuniĝon en marĉoj kaj aliaj malsekaj lokoj, kaj aĉe sonas la kvakado en la arbaro. Venis la sekskuniĝa tempo de urogaloj. Komenciĝas la interbatalo de virurogaloj. La printempo definitive venis, kaj ne estas plu risko, ke malvarma vetero frostdifektos la ovojn.

Kun hirtaj plumoj kaj lirforma vosto la urogaloj iras al atako, kaj tiu, kiu venkas, ricevas favoron ĉe la urogalinoj. Tute same okazas en tetraj seksludejoj. La batalo inter virtetroj estas pli kruda kaj krucla.

La batalo kaj la sekskuniĝo daŭras, laŭ popola aserto, ĝis la folioj de sorparboj kreskis ĝis grandeco de virurogalaj ungoj. La inoj metas la ovojn, kiujn ili elkovas, kaj post la fruprintempa birda vivo en la arbaro sekvas trankvila periodo. Dum tiu tempo vaganto en la arbaro vidas ne multe da birdoj aŭ aliaj bestoj. Nur malofte li fortimigas virurogalon aŭ virtetron, kiuj brue suprenflugas kaj malaperas.

La kvieto daŭras ĝis la somermeza tempo. Tiam la birdoj elkovis siajn idojn. Tie kaj tie oni timigas idaron de tetrao, de urogalo aŭ tetro. Per la vivo kiel enmetaĵo la inoj provas tiri al si la atenton de la homo, kaj ili ne ĉesas, antaŭ ol la malgrandaj idoj, kiuj nun aspektas kiel lanugaj buloj, sukcesas kaŝi sin en la tera kreskaĵaro. Kiam ili malaperis, kaj tion ili kapablas rapide fari, malaperas ankaŭ la patrinoj. La idaron de tetrao akompanas konstante kaj patro kaj patrino, kaj la idoj ne disiĝas antaŭ malfrua aŭtuno. Tiam ili formas parojn, kaj en paroj ili kunvivas ĝis la venonta printempo, kiam ili konstruas neston.

En Norrland (norda parto de Svedujo) la alkinoj ĝene-

rale naskas tuj antaŭ somermezo unu aŭ du idojn. La nasko ordinare okazas en izolitaj lokoj. Je la naskiĝo la idoj estas tre senpovaj, sed ili kreskas rapide. Tial ne daŭras longe, antaŭ ol ili forkuras pro danĝero aŭ proksimiĝanta homo. Estas ĝuste en tiu tempo, kiam la muskomarĉoj estas blankaj de rubusoj, kaj la homoj tiam deziras, ke dum la unuaj du semajnoj estu nek forta vento nek forta pluvo, por ke la rikolto de marĉaj rubusberoj fariĝu bona.

La tempo progresas ĝis somermezo. Se la printempo estis frua, la birdidoj jam tre evoluis. Ili ne plu aspektas kiel lanugaj buloj, kaj ili iom kapablas mem sen instigo de la patrino kaŝi sin de danĝeroj, kiujn ili kredas minaci de homoj aŭ rabobestoj.

La noktoj estas tute helaj, kaj la tutan nokton oni aŭdas la kanton de la kantoturdo. Jen kaj jen interrompas ĝin kanto de kukolo.

Denove vivas la somerpaŝtejo. Ĉirkaŭ ĝi kaj en la arbaro tintas sonoriloj de bovinoj kaj kaprinoj. Ĉirkaŭ la somerpaŝtejoj domoj flugas birdoj, kiuj suĉas mielon el sovaĝaj floroj. Sub la tegmentrandoj de la somerpaŝtejoj dometoj aŭ sur la muroj konstruas hirundoj siajn nestojn. Post la elkovo ili la tutajn tagojn flugas en la aero por kapti muŝetojn al la malsataj idoj.

Venas la kulmino de la somero. En la arbaro la aero estas saturita de bonodoroj de miriko kaj marĉa ledumo, betulaj folioj kaj koniferaj pingloj.

Tiel mi dum multaj jaroj, dum tagoj kaj noktoj, vespere kaj matene sekvis la vivon en la arbaro de la fino de marto ĝis la somermeza tempo. Ĉiam estis la samo. La malgrandaj diferencoj, kiuj troviĝis, estis nur en tio, ke la okazoj komenciĝis kaj finiĝis pli aŭ malpli frue, depende de la pli malpli frua veno de la printempo.

Komentoj

"Esperanto kaj lingva sento".

De Hjalmar Kihlberg.

Leginte la vere bonan artikolon Esperanto kaj lingva sento de Stellan Engholm en la antaŭa nro de tiu ĉi revuo mi deziras esprimi kelkajn pensojn pri la sama temo.

Super ĉio, kion kreas talenta kaj de sia temo profunde kaptita verkisto, kvazaŭ ŝvebas lia spirito. Kaj se la leganto ŝatas la legaĵon kaj harmonias kun la ideoj de la verkisto, li kvazaŭ sentas ion misteran, kio tuŝas lian koron. Tio validas altgrade ankaŭ por la verkoj de Zamenhof.

Homo, kiu arde deziras, ke esperanto venku, nepre sentas tiel legante en La vojo de Zamenhof tiujn ĉi liniojn:

Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
nek batoj de l' sorto, nek moko de l' homoj.

Pro tio, ke oni ŝatas, ĉe amas iun verkaĵon, tiu verkaĵo influas ankaŭ al nia lingvosento. Dum la legado kvazaŭ lumiĝas por ni la sentvaloro de la vortoj kaj frazoj en la koncerna verkaĵo.

Same kiel je legado de La vojo estas ankaŭ je legado de multaj aliaj poeziaĵoj de Zamenhof, ekzemple La espero, Mia penso, Al la fratoj, Ho, mia kor', Preĝo sub la verda standardo. En ĉiuj tiuj renkontas nin unuflanke tiu arda zamenhofa sento por popolfратиĝo pere de esperanto — do alia sento ol la speciale lingva — kaj aliflanke liaj persistaj espero kaj volo, ke esperanto iom post iom venku. La samon oni spertas ankaŭ legante lian prozon.

Se oni studas la zamenhofajn verkaĵojn, kaj la prozajn kaj la poeziajn, oni do proprigas al si per tiu studado iom post iom plibonigitan lingvosenton kaj samtempe ankaŭ lian senton por popolfратиĝo.

Se estas ĝustaj tiuj premisoj por proprigo de bona lingvosento, estas necese, ke la ĉefaj respondeculoj por la esperanta lingvo vere faru ion por igi la lingvistudentojn intimiĝi kun la sento de la lingvo. Por la t. n. Supera ekzameno ekzemple devas esti postulata interalie profundan konon koncerne la enhavon de gravaj partoj de Originala Verkaro de Zamenhof. Kaj tiuj ekzamenpostuloj devas esti la samaj en tuta Esperantujo, do internaciaj.

Por ricevi lingvosenton estas ankaŭ necese ofte skribi la lingvon. Se legado estas, oni povus diri, la pli pasiva formo de studado, la skribado estas la pli aktiva. Tia skribado ankaŭ

igas nin senĉese konsulti iun kompletan vortaron, ekz. Pl.V., kiun rekomendas Engholm en sia artikolo, por trovi en dubaj kazoj la plej bonan formon.

Estas necese havi temon por tia skribado. Temon ĉiu elektu kompreneble laŭ sia emo. Tiu, kiu ŝatas politikon, devas elekti sian temon el tiu mendio, kaj same abstinulo, kristano, pedagogo, sansportulo, pacamiko kaj aliaj elektu temojn el siaj specialaj interesregionoj. Krom tio estas dezirinde, ke ĉiu esperantisto interesiĝu pri la zamenhofaj ideoj pri popolfратиĝo kaj elektu ankaŭ tiajn temojn por sia skribado.

La plej konvena formo por tia skribekzercado estas la leterformo, kaj oni kompreneble devas korespondi kun eksterlandanoj.

Krom la lingva profundiĝo, kiun oni akiras per tia ĉiama leterinterŝanĝo, oni ankaŭ kunhelpas plekti ĉirkaŭ la tutan mondon tiun reton de amikeco, kiu nuntempe estas precipe necesa por fratigi la homaron, do helpas por tiu celo por kiu Zamenhof kreis sian lingvon.

En la mondon venis nova sento,
tra la mondo iras forta voko.

Esperantojurnalismo.

Nuntempe la ĵurnalistoj pli ol iam svarmas en Londono, sendube miloj. El ĉiuj anguloj de la mondo ili kolektiĝas. La tagaj okazoj en la diversaj landoj ŝajnas sensignifaj kompare kun la vere internaciaj okazoj, kiuj evoluas jen tie, jen tie, nun en Londono.

Ĉu inter tiuj ĵurnalistoj estas unu esperanta, unu, kiu oficiale reprezentas la esperantan gazetaron? Verŝajne ne! Tamen ni devus havi tian personon. Unu sufiĉus, sed li devus esti eksterordinara persono, kiu povus digne reprezenti nian movadon, viro — aŭ virino — kun karaktero kaj intelekto.

Kial ni ne havas tian personon, kiu povus montri la flagon? Ĉar esperanta gazetaro ne ekzistas. Ni havas sufiĉe grandan nombron da landaj, ĝenerale monataj gazetoj, plej ofte iom sensignifaj, sin okupantaj pri la hejma movado kun ĝiaj kafofabloj, promenoj kaj lokaj granduloj. Ni havas ankaŭ embrion de internacia esperanta semajna gazeto, sed kiom multaj el ni abonas ĝin? Kiom da jaroj forpasos, antaŭ ol nia speciale internacia movado — en nia aertrafika tempo — havos vere internacian, tagan esperantojurnalon?

Almenaŭ nia ĉefa kontoro — IEL — povus sendi reprezentanton, observanton, al tia granda kunveno kiel UNRRA en Londono.

P. Th. J.